

УРОК 6 – LECIONO 6

Грамматика – Gramatiko



– **ind** – суффикс обозначающий «достойный определенного отношения», «достойный чего-либо»: **aŭskultinda** – достойный быть услышанным, **rimarkinda** – достойный быть замеченным, **lerninda** – достойный быть выученным;

oni – неопределенно-личное местоимение, которое не переводится; обычно ему сопутствует глагол, который вместе с местоимением **oni** соответствует 3 лицу множественного числа или безличному обороту: **Oni** iras. Идут. **Oni** atendas. Ждут. **Oni** parolu! Пусть говорят. **Oni** devas. Нужно.

– **us** – окончание глаголов в условном наклонении: **Petro volus lerni pli bone**. Петр хотел бы учиться лучше. **Mi restus hejme**. Я остался бы дома.

Безличные глаголы употребляются без подлежащего и обозначают явления природы и различные отношения к происходящему: **Hodiaŭ pluvas**. Сегодня идёт дождь. **Utilas ridi**. Полезно смеяться. **Necesas multe labori**. Необходимо много работать. **Eblas promeni en parko**. Есть возможность (возможно) погулять в парке.

Задания – Taskoj



I. Прочитайте текст «Miĉjo malsanas».

Miĉjo malsanas

Hieraŭ estis dimanĉo. Bonega tago! Ĉar venis infanoj. Ili karesis Miĉjon, regaligis ĝin per bongustaĵoj, dancis ĉirkaŭ ĝi. Ankaŭ ĝi dancis!

Sed hodiaŭ estas lundo. Griza tago. Nokte ekpluvis. Miĉjo frostis kaj tremis en sia dometo. Sed oĉjo Boĉjo, la gardisto, ne alportis varman kovrilon. Li ronkis en la kuirejo tutan nokton. Tage Krim donis al li kvin dolarojn. Oĉjo Boĉjo aĉetis kontraŭ tiu mono du botelojn da vodko kaj fortrinkis ĝin.

Do, matene Miĉjo ektusis. Ĉu vi vidis, kiel tudas la mamutoj? Certe, vi ne vidis tion. Miĉjo levas la rostron, dolore kaj profunde enspiras aeron. Poste ĝi fermas la okulojn, malfermas la buŝon kaj tre sopire elmamutas: «Ŭah-Haa!!!». Kompatinda Miĉjo – ĝi ekmalsanis. Ĝi havas altan temperaturon – pli ol tridek ok gradojn. Oni devas urĝe kuraci Miĉjon.

Lidia maltrankvilas. Ŝi vorte mokis Boĉjon. Ŝi eĉ promesis plendi al profesoro Maksim. Se ŝi plendus, oĉjo Boĉjo perdus la laboron. Boĉjo ploretis kaj petis pardonon.

– Nu bone, – diris Lidia, – jen estas aspirino. Dum tagmanĝo donu al la malsanulo dek du tablojdojn.

Ne forgesu – precize dek du!

– Bele! – ekkriis oĉjo Voĉjo. – Bonega okazo! – kaj li kaŝe enmetis la tablojdon de Krim en la skatolon de Lidia. Poste li iris al Miĉjo kaj gratetis ĝian orelon.

– Ŭah-haa!!! – diris la mamutido.

– A-ap-ĉchi!!! – respondis oĉjo Voĉjo. – Nu, karuleto, verŝajne ankaŭ mi bezonas tablojdon...



tablojdoj



II. Ответьте на вопросы.

Kiu venis dimanĉe al Miĉjo? Kion ili faris? Kia tago estas lundo? Kial frostis Miĉjo? Kion faris oĉjo Voĉjo tutan nokton? Kio okazis matene al Miĉjo? Kiom altan temperaturon havas Miĉjo? Kio okazus al oĉjo Voĉjo, se Lidia plendus al profesoro Maksim? Kiom da tablojdoj transdonis Lidia al Voĉjo? Por kio? Kien Voĉjo metis la tabloidojn de Krim?

III. Найдите в тексте предложения, в которых описывается болезнь Миши. Прочитайте их и переведите.

IV. Переведите письменно, используя текст рассказа.

В воскресенье дети пришли к Мише. Они угостили его сладостями. Все танцевали. В ночь с воскресенья на понедельник шел дождь. Дядюшка Боря не принес теплое одеяло Мише. Боря храпел в кухне целую ночь. Утром Миша заболел. У него – высокая температура. Лидия обещала Боре пожаловаться Максиму. Боря всплакнул и попросил прощения. Лидия дала Боре аспирин для Миши. Боря обрадовался: «Замечательно! Я спрячу таблетку Крима среди таблеток Лидии».

V. Передайте устно краткое содержание текста по плану.

Dimanĉo – bonega tago.

Malbona lunda vetero.

Oĉjo Voĉjo kaj Krim.

Tuso de Miĉjo.

Pardonpeto de Voĉjo.

Aspirinaj tablojdoj.

VI. Прочитайте предложения и составьте другие по образцу.

Kia malfeliĉo! Mia patrino (mia avino, mia pliaĝa frato, mia patro, mia amiko...) malsaniĝis (ekmalsanis).

Feliĉe, nun ŝi (li) fartas bone (pli bone), tamen ŝi restas enlite (hejme).

Ŝi (li) malsanas, ĉar ŝi malvarmumiĝis (havas nazkataron).

Ŝi (li) ne fartas bone, ŝi havas kapdoloron (gorĝdoloron, dentdoloron).

Kuracist(in)o observis ŝin (lin) kaj preskribis medikamentojn (vitaminojn).

Kuracist(in)o permesis al ŝi(li) ekstari (iri surstraten, labori, lerni).

Ŝi (li) tre malsanas. Kuracist(in)o ne permesis al ŝi (li) ekstari (iri surstraten, labori, lerni).

Ŝi (li) ne manĝas (nenion).

Certe, necesas ke ŝi (li) kuŝu enlite.

Mi (mia patro, mia fratino) iras al apoteko por aĉeti medikamentojn (vitaminojn).

Feliĉe, ke oni ŝin (lin) ne hospitaligis.

VII. Составьте небольшой рассказ о своем заболевшем друге (подруге), опираясь на следующие вопросы.

Kiu malsaniĝis? Pro kio li (ŝi) malsaniĝis? Kiom da tagoj li (ŝi) kuŝas enlite? Ĉu oni vokis kuraciston? Kiel li (ŝi) kuracis sin? Kiel li (ŝi) fartas nun? Kion necesas fari por ne malsaniĝi (malvarmumiĝi)? Kiam li (ŝi) rekomencos labori (studi)?

VIII. Вставьте вместо точек подходящие по смыслу безличные глаголы: pluvi, necesi, utili, ebli, neĝi, suni.

Aŭtune ... ofte. ... helpi al maljunaj kaj malsanaj personoj. Mi ŝatas, kiam estas varmege kaj kiam En Rusio multe ... vintre. Matene ... bone kaj sate manĝi. Hieraŭ ... doni kuracilon al infano.

IX. Прочитайте и переведите следующие словосочетания, обращая внимание на значение суффикса – ind –. Составьте предложения с некоторыми из них: hontinda konduto, lerninda lingvo, aŭskultinda historio, leginda libro, vizitinda muzeo, aminda junulino, aĉetinda kostumo, kompatinda knabeto, pardoninda misago.

X. Составьте письменно предложения с неопределенно-личным местоимением oni и переведите их.

	rapidis	tre	muziko.
	laboras	sen	lernejo.
	enuos	eĉ	malfrue.
Oni	ridis	al	lerni Esperanton.
	pardonas	en	plezuro.
	tagmanĝos	ĉiam	tendaro.
	promesas	kun	malamikojn.



XI. Прочитайте фрагмент из книги «Mistero ĉe Nigra Lago» шведского писателя Стена Йохансона (Sten Johansson) и скажите, о чём в нём говорится. Обратите внимание на перевод следующих слов:

admoni – уговаривать
ĉagreni – огорчать
fajfi – свистеть
febroy – лихорадка

ferio – каникулы
gluti – глотать
gorĝo – горло
muta – немой

pluraj – несколько
skui – трясти
spiti – действовать наперекор
suferi – страдать

Mistero ĉe Nigra Lago

...Timo havas febron. De pluraj tagoj lia gorĝo tiel doloras, ke li preskaŭ ne povas gluti. Lia patrino dudekfoje tage admonas lin, ke li trinku, sed li ne volas. Ne eblas trinki sen gluti. Li ne respondas, ĉar eĉ paroli dolorigas lin. Li nur mute skuadas la kapon. Kuracisto diris, ke li suferas de angino. Sekve de tio, li ne povas iri al la lernejo dum la lasta semajno antaŭ la someraj ferioj. Tio tamen ne ĉagrenigas lin. La lernejo ne estas lia plej granda plezuro...

Nun li kuŝas en sia lito kaj enuas... Timo enlite rigardas la televidan muzikokanalon MTV. Panjo malpermesis al li rigardi ĝin dum pli ol horo, sed li fajfas pri tio. Ŝi pensas, ke li havos febron pro MTV!



televidilo

Freneze. Li eĉ devis spiti la gorĝan doloron por demandi, ĉu ŝi neniam aŭdis pri bakterioj. «Kiam mi estis infano, troviĝis nek televido nek bakterioj. Kaj neniuj doktoroj loĝis en la vilaĝo, do ni estis sanaj. Kaj nia sola medikamento estis – la saŭno»...



Ответьте на вопросы.

Kiu malsanas? De kio suferas Timo? Kial la malsano ne ĉagrenas Timo-n? Kie kuŝas Timo? Kion pensas panjo pri febro de Timo? Kia sola medikamento ekzistis dum antaŭaj tempoj en Finnlando? Ĉu vi ofte malsanas? Kiam vi malvarmumiĝas, kion vi faras por

resaniĝi?

XII. Прочитайте следующие пословицы и поговорки. Найдите их русский эквивалент.

Ne helpas ploro al doloro.

Akvo kaj pano servas al sano.

Ne doloras frapo sur fremda kapo.

La tempo estas la plej bona kuracisto.

Ключи к заданиям – Ŝlosiloj al la taskoj

Задание IV – Tasko IV

Dimanĉe infanoj venis al Miĉjo. Ili regalis Miĉjon per bongustaĵoj. Ĉiuj dancis. Nokte de dimanĉo al lundo pluvis. Oĉjo Boĉjo ne alportis kovrilon por Miĉjo. Boĉjo ronkis en la kuirejo tutan nokton. Matene Miĉjo ekmalsanis. Li havas altan temperaturon. Lidia promesis plendi al Maksim. Boĉjo ekporetis kaj petis pardonon. Lidia donis aspirinon por Miĉjo. Boĉjo ekĝojis: «Bele! Mi kaŝos tablojdon de Krim inter tablojdoj de Lidia».

Задание VIII – Tasko VIII

Aŭtune pluvigas ofte. Necesas helpi al maljunaj kaj malsanaj personoj. Mi ŝatas, kiam estas varmege kaj kiam sunas. En Rusio multe neĝas vintre. Matene utilas bone kaj sate manĝi. Hieraŭ utilis doni kuracilon al infano.